GISTO,AGO,2007

G.O.VASKE
Str. Esperanto, 880
95760-000 Kaiurbo-RS
ttt-kongrua skribo

888888888888888888888888888888888888888888888888888888888888888888888888888888

CHU HONTO?

Ekscitas min la scivolo, kial sxajne bonaj, kaj entuziasmaj gaùchaj geesperantistoj evitas uzi la verdan steleton sur la brusto dum ili iras surstrate. La pravigo, ke nur tre rare povas okazi ke oni renkontas fremdan samideanon ne sufichas. Dum luncho, dum achetoj ofte scivolaj homoj demandas nin, kion signifas tiu steleto. Jen motivo por per kelkaj vortoj pravigi nian idealon ofte al homoj kiuj neniam aùdis pri la ekzisto de Esperanto Ili eble petos ke vi diru kelkajn frazojn. Jen oportuno reciti facile kompreneblan poezion, kiel ekzemplon Tiu povus esti tre simpla kiel chi tiu: STUDENTA VIVO.--En la posx', Nula grosx'. En la bank' Saldo mank' Chel vendist' Sur la list' Chel mastrin' Sxuld' sen fin' Tru' en jak Kaj stomak'. Nula rich' Sed felich' Char knabin' Amas min.—Parkerigu!! Oni memoru, ke propagandi multon kostas, se pagenda. Ofte mi kuragxas pensi, ke niaj gesamideanoj hontas malkasxi ke ili scias la neùtralan lingvon. Se estas iu kasxita dangxero kiun mi ne scias, bv averti min, ke mi ne falu en kaptilon Se aliflanke la pravigo estas ke vi perdis vian steleton, tio montras ke via entuziasmo pri la nobla kaùzo estas nur suprajxa. Se vi estas ne luksema kaj ne volas uzi oran pinglon kun brila steleto, per nur kelkaj grosxoj akireblas simpla insigno.- De Cho-Ro-I mi mendis, aron da ili, por disdoni inter niaj diligentaj VK-kompanoj. Ankoraù ne alvenis kaj mi esperas ties reklamiloj.



.....CHILIO

Dum nia lasta semajnfina QSO, per Echo-Link, nia firma kompano Hektor sciigis la kl-olegojn ke tie, en Santiago li proponis kaj ke la ideo de Verda Kafo estis aplaùdita. Malfacilas diveni kial tiaj babilkunsidoj ne okazas jam delonge en chiuj urboj. Rimarkeblas ke la parolkapablo de diligentaj VK-anoj notinde kaj rapide plibonigxas. Ne miraklo! Bone sciatas ke paroli dependas de praktikado.

JOKOHAMA-UKE

Nia fidela samlandano, gaúcho kaj internacia civitano, Lenio=HL/PY3DF, ILERA-sekretario, ankaù chi-jare ne forlasis sian geston amikan sendante beljan posxtkartjon el Azio, el Jokohama kaj el la korea chefurbo Seul, kie li postkongrese turistis. Ni rajtas fieri pro nia aktivulo, kie ajn li edife QRM-as*. Certe Pro la granda horardiferenco mi ne trafis lin per EchoLink....*perradia jxargono signifas: enmiksigxas, perturbas ( Lenio, en prosperiga senso)

GRAVULOJ

Nomoj de E-patriotoj devas esti familiaraj al chiuj geesperantistoj. Kiu estas Humphrej Tonkin, Viliam Old. Kiun postenon havis Renato Korsetti? ... Kiu

estis Hasegaùa Teru, pri kies elstara agado eldonigxis libro vere leginda?

ONI SCIVOLAS

Moderne chiu urgxas, ofte komo troigas, tial sxvarmas tiom da komencliteraj grupoj en chiuj tekstoj. Oni sin demandas, kiu kurta vorto resumas trafan signifon, por difini la sursxoseajn ejojn (pedágio) kie veturigistoj devas halti, por pagi la rajton veturi tra la sxoseo? (deviga veturrajta pagejo). Mi proponas mallongigan kunmeton jene:VEtur-Rajtiga PAGEJO, per unu vorto =VERPAGEJO. - Chu vi elcerbumis vorton pli kurtan, pli gxustan?, BV prezenti gxin al ni.- GEA kaj la VK-anoj povos proponi gxin (kaj aliajn) al la Akademio de Esperanto, kies prezidanto estas nia samlandano Geraldo Mattos.‘

REAGOJ

Heninde!... el nia vasta aro da samideanoj kiuj kutimas legi nian chiumonatan bultenon GISTO, neniu sendis al mi etan tekston pri grava fakto okazinta en sia vivo, laù mia peto. Versxajne chiuj volas nur senpage legi ion kaj tuj forgesi la enhavon.Per tia pigro neniu ideo povas prosperas.

PLORADO

Mi tristas. La chefurba jxurnalo Korejo do Povo, publikigis leteron mian, en Julio, en kiu mi menciis la fakton, ke la angla lingvo estis PROVIZORE adoptita en aviado, ke gxi neniam suferis revizion kaj ke la plej alta instanco ICAO mem deklaras: lingvaj miskomprenoj estas la tria kaùzo de krasxoj, ke ekzistas Esperanto, preta kaj sen dubaj vortoj. Post tio mi tre esperis ke samideanoj amase inundus la Redakciojn de jxurnaloj, por aplaùdi jxurnalon kaj mian leteron, bonefike al nia nobla ideo. Bonsxance fora amiko, el Pato Branko, parte savis la Patrion. Jen domagxo kiu montras la abomenan mankon de solidareco far kompanoj de sama trancheo...sed, prefere malfrue ol neniam! Agu, antaùen!! “Go ahead”, se vi preferas angle krokodili.

BRANO

Dum la 81ª UKE, Brazilja, mi lernis de australia kuracisto: helpu vian digestosistemon. Chiam “semu” iomete da brano sur vian mangxajxon en via telero. Gxi garantios al .vi akuratan chiutagan malmangxohoron. La kuracisto kutimas porti en sia posxo flakonon da brano dum siaj vojagxoj.

EKOLOGIO

Karaj, mia filo CID transdonis al mi KD fare de la fama AL GORE, pri la perspektivo de la teranoj ene de 40 jaroj. Bonvenas sugestoj, kiel mi agu por igi gxin spekota de la plejeble multaj homoj.

Ridetu.

DEZIROJ

Bofilo kaj bopatrino silente abomenis unu la alian. Certan tagon tamen la bopatrino ne plu eltenis sian animpremon kaj eksplodis: – Iru al la infero, sxi diris rugxega pro kolero.
La bofilo repagas per dibochema rideto:
- Kiel vi estas maldankema, mia kara bopatrino, sendi al la infero gxuste min, kiu chiutage pregxas al Dio, ke Li kunvoku vin al la Chielo!

PASTRO MALKONTENTA

En sama tago mortis pastro kaj taksi-sxoforo. Alvenintaj en la Chielon la pastro ricevis tre modestan dometon por tie restadi. La taksiisto ricevis belan rezidejon. La pastro memkompreneble ne kontentis kaj iris al la Diapatro por havigi al si pravigon por la diferenca trakto.
Dio: kiam vi predikadis la kredantoj pace dormetis; kiam li taksiis, la pasagxeroj fervore pregxis.